

BRAZILA ESPERANTISTO

77-a Jaro

Oktobro-Decembro 1983

N-ro 279



Urbo Manaus, Stato Amazonas: Teatro Amazonas
(Foto el Turisma Brazilo)

Oktobro- Decembro 1983

77-a Jaro

N-ro 279

Brazila Esperantisto
("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de Brazila Esperanto-Ligo,
societo de publika utileco, laŭ registara
dekreto n-ro 4.356, 26/10/1921

Respondeca Direktoro: Fernando Marinho
Redaktoro: Luiz A. B. Martins

Administracio kaj Redakcio
Praça da República, 54 - 2º
20211 - Rio de Janeiro, RJ, Brazilo

Senpaga por anoj de B.E.L.
Eksterlande: 10 respondkuponoj

LA KORVO
kaj aliaj poemoj

kasedo kun jena enhavo:

unua flanko:

- La Karitato kaj la Justeco, Guerra Junqueiro
- Vojaĝantaj Turtoj, Coelho Neto
- La Korvo, Edgar Allan Poe

dua flanko:

- La Balado de Prizono Reading, Oscar Wilde

Ĉiujn poemojn

tradukis Leopoldo H. Knoedt

Voĉoj de

Iracema kaj Leopoldo Knoedt

Prezo: Cr\$ 3.000,00
(plus sendkosto)

**Ne forgesu: pagu vian
kotizon por 1984**

Liga Brasileira de Esperanto

Quota anual de adesão
1984

M S categoria destinada aos que não são esperantistas mas simpatizam com o movimento, o sócio tem direito a utilizar a Biblioteca e o serviço de livros, participar das atividades sociais e receber os boletins editados pela Liga. Inscrição:

- a) até 31.12.83 Cr\$ 2.000,00
- b) após 1.01.84 Cr\$ 3.000,00

M 1 categoria destinada àqueles que já estão integrados no movimento esperantista; recebe o mesmo que o M S. Inscrição:

- a) até 31.12.83 Cr\$ 6.000,00
- b) após 1.01.84 Cr\$ 9.000,00

M 2 tem os mesmos direitos que o M 1. Paga uma quota mais alta para auxiliar a B.E.L. e o movimento. Inscrição:

- a) até 31.12.83 Cr\$ 18.000,00
- b) após 1.01.84 Cr\$ 27.000,00

D M categoria destinada àqueles que desejam integrar o quadro social da Liga na qualidade de Membro Vitalício. Paga a importância correspondente a 30 vezes o valor da quota M 1. Tem os mesmos direitos que o M 2. Pagamento:

- a) até 31.12.83 Cr\$ 180.000,00
- b) após 1.01.84 Cr\$ 270.000,00

Todas as importâncias devem ser remetidas, em cheque pagável no Rio de Janeiro, ou vale postal, em nome da Liga Brasileira de Esperanto: Praça da República, 54 - 2º andar, 20.211 - Rio de Janeiro, RJ.

Curso por Correspondência
1983

A Liga Brasileira de Esperanto mantém os seguintes cursos por correspondência: básico, de aperfeiçoamento, superior e magistral.

Taxa de inscrição:

- a) até 30/06/83 Cr\$ 6.000,00
- b) após 30/06/83 Cr\$ 9.000,00

A taxa de inscrição é a mesma para todos os cursos.

Os cursos são privativos dos sócios da Liga.

A inscrição para os cursos por correspondência poderá ser feita em qualquer época do ano.

Honoro al la memoro de

L. L. Zamenhof

En Brasília, la Centro de Dokumentado kaj Informado de la Ĉambro de Deputitoj publikigis 20-paĝan broŝuron kun la paroladoj faritaj en la 24-a de Septembro 1981 de la federaciaj deputitoj Vasco Neto, Antonio Moraes kaj Freitas Nobre.

En sia parolado la deputito Vasco Neto elstarigis la delikatan senton de Zamenhof ankoraŭ junaĝa antaŭ la malkompreniĝo, konfliktoj, malpacoj kaŭzitaj de la lingva diverseco en Białystok. Tiu delikata sento estiĝis en la spirito de Zamenhof la neceso krei ilon por kompreniĝo inter la popoloj. Meze de tiu atmosfero saturita de malpaco, subpremo kaj ĉiaj diskriminacioj Zamenhof ekkomprenis, ke nur komuna komprenigilo devus esti iom post iom starigita inter la malsamaj kulturoj malamike sin atakantaj pro naciaj movadoj, kiuj konstruas nenion krom la potencon de la plej militemaj kaj regemaj kaj la malunuigo de la societo, kiu iam estis unu sola familio.

Esperanto estis la granda idealo kiu plenis la tutan vivon de Zamenhof, malgraŭ la miskomprenoj kaj kritikoj de multaj. Sed la okazigo de la I-a Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer eble estis unu el la plej grandaj ĝojoj kiun Zamenhof spertis. En atmosfero de ĝojo kaj frateco Zamenhof parolis al la kongresanoj. Eble la sama etoso ankoraŭ sentiĝas en ĉiuj Universalaj Kongresoj kiel en la 66-a okazinta en Junio 1981 en Brazilo, en kiu estis aprobita jena Rezo-lucio:

Universala Esperanto-Asocio, kunsidante en Brazilio de la 25-a de Julio ĝis la 1-a de Aŭgusto 1981, dum la 66-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestas pli ol 1.700 partoprenantoj el 50 landoj,

notante la danĝeron de ĉiam pli fortiĝanta influado de la amaskomunikiloj en la direkton de senindividuigo de la homoj en la moderna amasocio,

notante la minacon de ĉiam pliigi submetiĝo de la homoj al unudirekta influado de informoj, al kiuj ili ne havas la ŝancon re-

agi krom pasive,

notante, ke kultura influado de la grandaj lingvoj de la hodiaŭa mondo tendencas subigi kaj eventuale forigi la malgrandlingvajn kulturojn, kaj senigi ties anojn de la rajto je propra kulturo,

atentigante pri la celoj de la Internacia Lingvo Esperanto krei ponton inter la popoloj kaj tiel kontribui al vera interkomuniko inter ĉiuj homoj sur la tergloblo sur neŭtrala lingva bazo,

konstatas, ke aktiva partopreno de la individuo en kultura interagado estas ebla nur tiam, kiam li/ŝi disponas pri "pontoj" perme-santaj dudirektan komunikadon,

konstatas, ke la Internacia Lingvo Esperanto jam pruvis siajn kapablojn servi kiel taŭga dudirekta ponto inter diferencaj kulturoj,

konstatas la etikan valoron de la Internacia Lingvo Esperanto en interhoma kaj interpopola komunikado,

alvokas al individuoj, etnaj grupoj, nacioj, ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj agnoski la atingojn kaj valorojn de la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝian potencialon krei plenkomunan ponton inter la diversaj kulturoj de la mondo, cele al formiĝado de aktiva kaj konscia kulturo, kaj reprezentante, sur internacia skalo, la plej altajn homajn valorojn kaj aspirojn.

Laŭ la deputito Antonio Moraes multaj homoj ankoraŭ ne komprenis, ke Dio kreis siajn gefilojn por amo kaj paco kaj ne por milito kaj detruo. Multaj serĉas la pacon kaj multaj pro ĝi mortas; malmultaj sincere deziras ĝin, ĉar iliaj intencoj kaj agoj malkonfirmas la pacdeziron. La paco ne estos nur trovita en la diplomaciaj kaj komercaj interkonsentoj; oni trovos la pacon per aliaj rimedoj. La granda L. L. Zamenhof trovis rimedon donaci sian kontribuon por la universala paco. Li sukcesis krei la lingvon Esperanto, kiu fariĝis instrumento por la universala kompreniĝo inter la homoj. Tial oni de-

vas konsideri lin kiel apostolon de la paco.

Fine parolis la deputito Freitas Nobre, prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj. Li diris, ke li sentis sin feliĉa pro la honoro al la memoro de Zamenhof, unue ĉar en Julio pasinta en tiu ĉambro okazis la solena malfermo al la 66-a Universala Kongreso de Esperanto; due ĉar akceptante tiun ĉi rememoron al la genia Zamenhof la ĉambro de Deputitoj de Brazilo enviciĝas inter la sennombraj institucioj, kiuj publike rekonis la gravan signifon de Esperanto.

S-ro Freitas Nobre asertis, ke la honorigo al la memoro de Zamenhof estas agnosko de la valoro kaj aktualeco de ties ideoj rilataj al

la neceso de kompreniĝo inter la popoloj spite la sentojn de raso, religio kaj ideologioj.

S-ro Fretas Nobre finis sian paroladon per jena citaĵo el Zamenhof (Parolado en la Unua Kongreso 1905):

"Post multaj miljaroj da reciproka surdmuteco kaj batalado, nun en Bulonjo-sur-Marro fakte komenciĝas en pli granda mezuro la reciproka kompreniĝado kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro; kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos, sed irados antaŭen ĉiam pli kaj pli potence, ĝis la lastaj ombroj de la eterna mallumo malaperos por ĉiam. Gravegaj estas la nunaj tagoj en Bulonjo-sur-Marro, kaj ili estu benataj!"



Signoj de novaj tempoj

Aloisio Sartorato

Se oni devus elekti epiteton por la XVI Brazila Seminario de Esperanto, okazinta en Ouro Preto, MG (21-24/7/83), tiu sendube estus "neforgesebla".

Unue, oni ne povus silenti pri la belega loko kie okazis la kunvenoj kaj kie gastigis la plej granda parto de la seminarianoj. Temas pri "Colégio Dom Bosco", granda kaj solida konstruaĵo, datiĝinta de la fino de la XVIII jarcento, kaj enhavanta ĉarman internan ĝardenon kun multaj kaj belaj floroj kaj troviĝanta preskaŭ 30 km for de Ouro Preto.

Pri la Seminario mem estas malfacile elstarigi, kiu estis la plej grava ero. Ĉu la Malferma Kunsido, kie ĉirkaŭ 400 homoj aŭdis belegajn parolojn de pluraj salutintoj (interalie, tiujn de S-ro Onésimo da Costa e Faria, la kunordiganto de la Seminario: "Sadler ne estas angla esperantisto sed esperantisto kiu naskiĝis en Anglujo")? Ĉu la kursoj gviditaj de du el inter niaj plej eminentaj samideanoj, Geraldo Mattos (Metodologio de la esperanto-instruado) kaj Sylla Chaves (Metodo Kantu kaj Lernu), kaj atente sekvataj de po ĉirkaŭ 50 personoj? Aŭ la tre interesaj prelegoj prezentitaj de kompetentaj brazilaj esperantistoj, kiuj sukcesis plenigi la tutan salonon disponigitan tiucele (Paulo Sérgio Viana – "Kultura Fakturo en Nutrado"; Nelson Pereira de Souza "La Granda Ŝtupo"; Carlos Lima Mello "Homeopatio"; Ivon Barbosa "Problemo pri ata/ita"; Pau-

lo Amorim Cardoso – "Logozofio"; Walter Francini – "Pri la Minana Konspiro")? Aŭ ĉu la belega kaj ĉarma teatra spektaklo, prezentita en la urba teatro, sub la reĝisoreco de Lima Cipollatti, pri la "Minana Konspiro"?

Tamen, miaopinie, la plej grava ero de la tuta programo okazis sabate, vespere, inter la 20-a horo kaj noktomezo, kiam dudeko da homoj kunvenis por diskuti pri la nuna brazila E-Movado. Ĉeestis, interalie, estraranoj de la tri landaj E-organizaĵoj, D-ro Victor Sadler, Gesinoroj Grattapaglia kaj kelkaj gvidantoj de lokaj movadoj. Dum kvar horoj, preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj prezentis sian opinion pri la temo. Sincere, kelkfoje eĉ akre, sed, ĉe la fino, la rezulto estis, sendube, multflanke pozitiva.

Kaj, tute certe, konsekvenco de tiu sabata kunveno estis la decido prenita, la sekvintan tagon, de la tri landaj brazilaj organizaĵoj, kiu signas la etoson regantan en la tuta Seminario: ekde 1984, la tri landaj brazilaj organizaĵoj rezignos pri siaj propraj tutlandaj kongresoj aŭ seminarioj favore al unusola Brazila Esperanto-Kongreso sub la aŭspicioj de la tri Organizaĵoj (BEL, BKE kaj KKE).

Tiu decido, por kelkaj, estas malgranda paŝo! Tamen, se oni konsideras la miskomprenojn kaj netoleremon kiuj regis en la brazila movado antaŭ kelkaj jaroj – ĝi estas alia "malgranda granda paŝo"!

JUBILEO DE ESPERANTO

En 1981, la agadplano por la "Programo por la Jubileo de Esperanto" ricevis sian finan formon kaj en la sekvanta jaro, U.E.A. eldonis broŝuron kun la titolon "Kiu faru kion", en kiu punktoj de la agadplano estas rearanĝitaj laŭ grandaj branĉoj. Tiu broŝuro estas gvidilo por la unuopaj instancoj kaj membroj de la Esperanto-komunumo kaj en ĝi ĉiu esperantisto povas facile trovi sugestojn pri tio, kion li faru.

La ĝeneralaj celoj de la programo estas:

1) igi la ĉefajn internaciajn organizojn kaj la registarojn de la mondo konkrete agnoski Esperanton. Tiu agnosko povus havi plej variajn formojn: de simplaj deklaracioj aŭ rezolucioj ĝis praktika utiligo de la Internacia Lingvo;

2) vaste konsciigi la publikon pri:

- a) la rolo de la lingvoj en la socio;
- b) lingvaj problemoj, precipe internaciaj;
- c) la historio, nuna stato kaj perspektivoj de Esperanto;

3) vaste pligrandigi la nombron de simpatiantoj al Esperanto, kiuj havu vojon por identigi sin kun Esperanto kaj kun la lukto kontraŭ lingvaj problemoj kaj por la lingva egaleco;

4) plifirmigi kaj plifortigi la Esperanto-komunumon per retrorigardo al ties historio kaj atingoj kaj per antaŭplanado de ĝia estonta agado kaj progresigo.

En la antaŭparolo al "Kiu faru kion", D-ro Renato Corsetti, Vicprezidanto de U.E.A., klarigas, "ke temas pri tridirekta strebado: la unua celo emfazas la neceson plifortigi la agnoskon de la Internacia Lingvo fare de publikaj instancoj; la dua kaj tria celoj substrekas la informadon al la ĝenerala publiko kaj la sekvan fortikigon de la Movado mem; la kvara celo estas intern-direkta kaj ĝi celas firmigi la ligojn en la esperantlingva komunumo kaj ĝian fidon en si mem, en sia kulturo kaj en sia estonteco."

La plenumontoj de la Programo estas U.E.A., internaciaj asocioj, Esperanto-gaze-

taro, landaj asocioj, lokaj grupoj kaj unuopa esperantisto. Nur per kunlaboro de ĉiuj anoj de la Esperanto-komunumo ni sukcesos plenumi la Programon, kies celo estas konscii la publikon ke Esperanto estas la sola vera solvo por la lingvaj problemoj en la internaciaj rilatoj.



Brazilo: unua premio

Nia semideano Jorge Soares das Neves ricevis la unuan premion en la Poezia Konkurs 1983 starigita de Triesta Esperanto-Asocio (Italujo). En la kuranta jaro la temo estis "Internacia Amikeco" kaj S-ro Jorge das Neves prezentis la poeziaĵon *Amikeco*.

La aliaj gajnintoj estas: 2-a premio — Fino, de Carmel Mallia (Malto); 3-a premio — Viv-Krepusko, de J. Kohen-Cedek (Israelo); 4-a premio — Spegulo, de Lilli Giloteaux (Francujo); 5-a premio — Aktoro, de Lina Gabrielli (Italujo).

Jen la unua premio:

Amikeco

Jorge das Neves

*Jen fabela pejzaĝo kun vetero
kutime suna, blua la ĉielo
stelplenaj noktoj. . . Pepas ja pasero
en la lando de floro kaj mielo!*

*Sed l' amikeco estas la mistero
de la ĉarmo sur tiu grundo, celo
de la dioj ŝvebantaj en l' aero
renkonte al feliĉo kaj al belp. . .*

*Amikeco senpaga, neprograma
naiva, komplezema, tute pura
de popolo sincere tre gastama*

*Amikeco nenie pli trankvila
ĉar ĝi estas normale plej natura
en ĉiu koro vasta kaj ĝentila!*

Aliĝu por 1984

FIZIOLOGIO DE LA DORMADO

Paulo Sérgio Viana

La graveco de la dormado povas tuj evidentiĝi, se oni memoras, ke unu kvaronon ĝis unu trionon de la vivo oni pasigas dormante. Tio atingas la suman tempon de 20 jaroj en mezlonga vivo. Nia okcidenta pensmaniero emas domaĝi tian "tempo-perdon", konsiderante, ke la dormado estas ia foresto de la vivo mem, kvazaŭ duon-morto tute senutila kaj senprofita. Tamen, la fenomeno dormi estas ankoraŭ granda mistero, kaj eble venos la tempo, kiam la scienco montros, ke la Naturo ne fordonus tiom da tempo al balastaĵo sensenca. Eble montriĝos, ke dormo okupas altrangan funkcion en la vivo, se oni iam perceptos ian signifon trans la konscio.

La scienca esplorado de la dormo estas relative nova kaj nuntempe eĉ intensa, en la klopodo klarigi ĝian naturon kaj esencon. Per subjektivaj kaj per ekzaktaj metodoj oni studas hodiaŭ ĝian kompleksegan fiziologion. La unua konkludo ŝajnas montri, ke ĝi estas individueca sperto: ĉiu individuo dormas laŭ sia persona kaj originala maniero. La nuna problemo estas fiksi la limojn de variado, inter kiuj oni povus konsideri la dormon "normala".

Dum dormo forestas konscio. Dormanto senkonscie suferas gamon da ŝanĝoj en sia menso kaj metabolismo, kaj senkonscie, kvazaŭ per ia "tempo-horloĝo", vekiga. La natura periodo propra por dormi estas la nokto, leĝo sekvata de la plejmulto el la bestoj. La moderna homa vivo foje igas dormi tage, kaj tio pruviga ne same ripoziga, kaj sendube malutilas laŭ la pasado de la tempo. Beboj bezonas 18-20 horojn da dormado ĉiutage; maljunuloj 5-7 horojn; plenaĝulo 7-9 horojn; kreskantaj infanoj 12-15 horojn. En tiu kalkulo eble la genetika trajto de la individuo forte influas.

La fiziologia kaŭzo de la dormo ankoraŭ ne estas plene konata, kaj diversaj teorioj aperis (Teorio de la Neŭronoj, de la Cerba Iskemio, Kemia Teorio, k.a.). Oni scias, ke la Centro de Dormado situas en la Diencefalo; se oni stimulas la hipotalamon kaj certan regionon de la Diencefalo, oni dormigas beston. Krome oni scias, ke kelkaj kemiaj substancoj, ĉefe serotonino kaj noradrenalino, agas decide en la fenomeno. La encefalogra-

mo montras diversajn ŝanĝojn dum la dormo, laŭ ĝia profundeco. Ekzistas 2 ĉefaj fazoj: dormado kun "Rapidaj Okul-Movoj" (ROM-dormo) kaj sen-ROM-dormo, ĉar oni observis, ke en certaj momentoj, dum la nokto, la personoj rapide movas la okulojn en horizontala direkto (koincide kun la sonĝado) kaj en aliaj momentoj la okuloj restas senmovaj. Krome, la fazo sen-ROM dividiĝas en 4 aliajn stadiojn, laŭ la pli profunda endormiĝo (stadioj 1, 2, 3, 4). Ĉiu stadio havas propran encefalograman identigeblan desegnon. La encefalogramo montras la kemielektran funkciadon de la cerbo, kaj oni observis, ke dum la dormo, karakterizaj ŝanĝoj okazas en la encefalogramaj strekoj. En specialaj laboratorioj pacientoj estas studataj kun elektrodoj fiksitaj al iliaj kapsuproj. Samtempe, aliaj elektrodoj estas fiksitaj apud la palpebroj por registri la moviĝojn de la okuloj. Kaj krome ankoraŭ aliaj elektrodoj estas fiksitaj sub la mentono, por mezuri la muskolan tonuson. Per tia metodo oni povas registri la fenomenojn okazantajn en la cerbo dum la dormado. Kaj oni malkovris, ke okazas ripetigantaj cikloj dum la dormo, alternantaj ROM kaj sen-ROM-fazoj; tiuj cikloj daŭras ĉirkaŭ 90 minutojn kaj ripetiĝas 4-6 fojojn dum nokto. Kelkfoje okaze de ROM-fazo, la paciento duone aŭ komplete vekiga, antaŭ ol denove komenci novan ciklon. Oni ankaŭ observis, ke la ROM-fazo havas encefalograman, okulograman kaj miografian desegnojn tre similajn al tiu de la nedormantaj personoj, kaj pro tio ROM-dormo estas ankaŭ nomata "Paradoksa" dormado.

Eble tiuj cikloj okazas ankaŭ dumtage, eĉ sen dormo, kaj tio povas ekspliki la okazan variadon de la cerba kaj ceteraj aktivecoj de la individuo dum la tagperiodo.

Aro da fiziologiaj ŝanĝoj akompanas la dormadon: la sangpremo reduktiĝas, escepte se okazas ekscita sonĝo; la korbato estas malpli ofta; la spirado fariĝas pli malrapida kaj foje neregula; la metabolismo malintensiga; la temperaturo iomete falas; la muskol-tonuso minimumiĝas; la urinvolumo malpliiga; la kvanto da likvaĵoj eligata tra la ŝvito pligrandiĝas; salivo kaj larmoj reduktiĝas; la digestado restas senŝanĝa.

Kurioza fakto estas, ke la homoj en la tuta mondo, sub la plej malsamaj kulturoj, tendencas krei "ritojn" antaŭ ol dormi: apartaj sintenoj en la lito, ŝanĝo de vestoj en certaj lokoj aŭ horoj, uzado de specialaj lit-tolaĵoj aŭ kusenoj, k.t.p.

Alia interesa konkludo rilatas al la kvalito de la dormado: se la persono estas ĉiam vekita antaŭ ol atingi la stadiojn plej profundajn (stadiojn 3, 4), ĝi fariĝas laca kaj senvigla. Poste en la sekvantaj cikloj, tiuj personoj konsiderinde plilongigas la daŭron de siaj stadioj 3 kaj 4.

Kiam oni endormiĝas, okazas spasma de la tuta korpo, rezulte de subita reduktiĝo de la aktiveco, kaj tiu spasma ĝenerale ne estas perceptata de la paciento. Tamen kelkfoje ĝi estas tiel intensa, ke li skuite revekiĝas.

Ankaŭ speco de blindeco okazas, kaj estas konata la fakto, ke homoj ekdormas kun malfermitaj okuloj, sed ne kapablas vidi la scenojn antaŭ si.

La influo de la ĉirkaŭantaj okazaĵoj sur la dormon estas alia interesa fenomeno: ĉirkaŭantaj eventoj influas ne tiom laŭ ilia intenseco aŭ ofteco, sed laŭ la fazo de la dormo en kiu ĝi okazas (oni pli facile vekiĝas en la stadio 1, ol en la stadio 4), aŭ laŭ la emocia signifo de la evento (laca patrino eble ne vekiĝas pro ekstera ŝtormo, sed tuj vekiĝas se ŝia infano milde grumblas en la apuda ĉambro).

Rilate la sonĝojn, jen oni alfrontas unu el la plej kuriozaj kaj nekonataj fenomenoj de la menso. Kiel dirite, la sonĝoj okazas nur en la fazoj de dormado, kiam la paciento movas la okulojn (ROM-dormo). Ĉiu normala homo sonĝas diversfoje en la nokto, sed ofte ne rememoras ĝin poste. Dum la ROM-dormado, la cerba aktiveco tre similas tiun de sendorma homo, kvazaŭ oni restus vekiginta en alia "nivelo". Ĉe diversaj bestoj oni povis registri netajn ROM-fazojn dum dormado, kaj eĉ ĉe antaŭtempaj homaj ĵusnaskitoj oni jam konstatis tion. Ĉe beboj kiuj naskiĝis kun gravaj difektoj en la cerbo, eĉ kun kompleta foresto de la cerbaj hemisferoj (do

nekapablaj longe vivi), en tiuj tamen persistas ROM-dormo registrebla.

Pri la graveco kaj signifo de la dormo kaj sonĝoj oni multe diskutas. Homoj kaj bestoj al kiuj oni malpermesas dormi toleras tion ĝis certa tempo, sed post tiu limo komencas prezenti plej diversajn mensajn ŝanĝojn: agresemo, memorperdo, deliroj, perdo de rezonkapablo kaj eĉ halucinoj kaj psikozaj statoj. Tamen tiuj ŝanĝoj ĉiam malaperas, se la paciento poste longe kompanse dormas. En kelkaj okazoj, oni konstatis, ke homoj restis ĝis ĉirkaŭ 200 horojn sendormaj, sen gravaj psikaj ŝanĝoj. Do ŝajnas, ke la dormo funkcias kiel ekvilibrigilo en la menso. Similie se oni malpermesas, ke li sonĝu (t.e., se oni malpermesas, ke li atingu ROM-dormon), iom post iom okazas psikaj subtilaj ŝanĝoj. Ĝenerale oni konsideras la sonĝojn kiel manifestiĝojn de la nekonscio, ĉiam kun interna signifo esprimiĝanta per simboloj. Ĉi-rilate la plej gravaj kontribuoj eble troviĝas en verkoj de S. Freud kaj C. G. Jung. Memori la sonĝojn kaj ĉefe mem kompreni ĝian simbolan signifon en la kadro de la psikologia situacio de la persono povas oferi al ĝi gravajn elementojn por emocia ekvilibro kaj matureco. Estas ankaŭ pruvite, ke la sonĝoj ne obeas nian ideon pri tempo kaj spaco. Dum minutoj oni povas sonĝi pri faktoj daŭrantaj longan tempon, kaj inverse. Krome, estas konataj la sonĝoj, kiuj antaŭvidigas faktojn poste konstateblajn. Ĉiu homo devus klopodi memori kaj kompreni la signifon de siaj sonĝoj, en la klopodo kompreni sin mem pli profunde.

Pri medikamentoj modifantaj aŭ kaŭzantaj dormon oni povus prepari longan liston. Lastatempe danĝera trouzo de "trankviligiloj" dissemiĝas tra la tuta mondo. Medikamentoj influas sur la dormon per nebone komprenataj manieroj. Fakte oni jam eltrovis drogojn kiuj kaŭzas dependon en nur malalta grado. Tamen oni scias, ke la plejmulto el ili forigas la ROM-fazon de la dormo (do, ne permesas sonĝadon), kio povas modifi la psikon en ne taksebla grado. Krome, pilolo ne enhavas la solvojn por la angoroj de la vivo. Maldormo estas klasike konata kiel unu el la unuaj simptomoj de neŭrozo, kaj ĝia solvo ne kuŝas en kemiaĵo.

JE LA FLANKO DE LA PROFETO Italo Chiussi

Originale verkita en Esperanto
Serio "Oriento-Okcidento"

27 rik

(Resumo de prelego farita en la sidejo de
B.E.L., en 27.10.1979)

"REFORMADOR" CENTJARA

En la kuranta jaro, la revuo "*Reformador* (Reformisto), oficiala organo de Brazilia Spiritisma Federacio, fariĝas centjara. Fakte, la 21-an de Januaro 1883, Augusto Elias da Silva publikigis ĝian unuan numeron.

Jam en 1865, la brazilaj spiritistoj sentis la neceson disvastigi la Spiritisman Doktrinion per propra periodaĵo. En 1869, en ŝtato Bahia, fondita de Luís Olímpio Teles de Menezes, aperis la unua spiritisma periodaĵo en Brazilo, *O écho d'Além-Tumulo* (*La Trans-tomba eĥo*), bedaŭrinde nelongedaŭra. De 1875 ĝis 1882, aperis 7 spiritismaj periodaĵoj ĉiuj ne plu ekzistantaj.

Antaŭ plena jaro post ĝia apero, *Reformador* fariĝis organo de Brazilia Spiritisma Federacio ankaŭ fondita de Augusto Elias da Silva. Ĝi estas la plej antikva brazilia spiritisma periodaĵo kaj la kvina en la Mondo. En ĝiaj paĝoj estas registritaj la historio de Spiritismo en Brazilo.

De multaj jaroj, *Reformador* publikigas paĝojn en aŭ pri Esperanto. La plej fekunda kunlaboranto por la Esperanta fako estis Ismael Gomes Braga, eksvicprezindanto de Brazilia Esperanto-Ligo. Nuntempe respondecas por tiu fako nia samideano Affonso Borges G. Soares.

Brazilia Esperanto-Ligo kaj *Brazilia Esperantisto* honorigas la memoron de Augusto Elias da Silva kaj sincere gratulas Brazilan Spiritisman Federacion pro tiu signifoplena okazaĵo.

■ ■ ■

ANDAJ ONDOJ

Andaj Ondoj estas la oficiala organo de la "Centro por la Disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto" (Apartado Aéreo 88999, Bogotá, Kolombio) kaj la saluta numero aperis en Julio-Aŭgusto 1983, okaze de la 68-a Universala Kongreso de Esperanto, en Budapeŝto.

Estas menciinda la artikolo "Esperanto en Kolombio" kun pluraj informoj pri la Esperanto-Movado en Kolombio.

Redaktas: Luis Jorge Santos-Morales kaj Lyana Maria Amaya.

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Ata da Assembléia Geral Ordinária de 25 de junho de 1983

Aos vinte e cinco dias de junho de mil, novecentos e oitenta e três, às 15,00 h, em sua sede, na Praça da República, 54, 2º andar, reuniu-se em sessão ordinária a Assembléia Geral da Liga Brasileira de Esperanto, convocada na forma dos Estatutos. Presidiu a sessão o Sr. Fernando José Galvão Marinho, presidente da Liga Brasileira de Esperanto, e secretariou-a o Sr. Luiz Alberto Martins, secretário geral. Verificada a presença de número suficiente de associados e de representantes de instituições filiadas, o Presidente abriu a sessão, que se iniciou com a leitura da ata de Assembléia anterior, aprovada sem discussões. Em seguida, o Presidente apresentou a ordem do dia, composta dos seguintes itens: a) Relatório do Presidente; b) Substituição de Membros da Diretoria; c) Centenário do Esperanto (1987); d) Assuntos gerais. *Relatório do Presidente* — O presidente Fernando Marinho leu o Relatório das principais atividades dos primeiros meses de mandato no qual salientou especialmente a necessidade de se ampliar o número de voluntários que queiram se encarregar de alguns setores de trabalho. Terminada a leitura do Relatório, o Dr. Sylla Chaves propôs um voto de louvor pelo trabalho até então realizado, principalmente pela regularidade dos boletins de informação. *Substituição de membros da Diretoria* — O Presidente leu o pedido de demissão do primeiro secretário Luiz Alan Gomes Romero e lamentou o afastamento deste companheiro que vem servindo à nossa causa há tanto tempo. Propôs o Presidente o nome do Sr. Joel Vazquez Manso, atual segundo secretário, para ocupar a vaga do Sr. Luiz Alan Gomes Romero e para o cargo de Segundo Secretário a Srta. Valéria Oliveira Santiago. Ambas as propostas foram aprovadas unanimemente. Deste modo, a Diretoria da Liga Brasileira de Esperanto passou a ter a seguinte composição: Presidente - Fernando José Galvão Marinho; Vice-Presidente - Floriano Negreiros de Vasconcelos Pessoa; Secretário Geral - Luiz Alberto

Brazilia Esperanto-Ligo
kaj
Brazilia Esperantisto
deziras al vi
FELICAN NOVJARON

Brandão Martins; Primeiro Secretário - Joel Vasques Manso; Segundo Secretário - Valéria Oliveira Santiago; Tesoureiro - Aloísio Sartorato. Conselho Fiscal - Jorge Campos de Oliveira, Mario Ritter Nunes e Sylla Magalhães Chaves. Conselho Consultivo - Braz Cosenza (RJ), Carlos A. S. da Cunha (SP), Francisco Barbosa Filho (CE), Geraldo Mattos (PR), Ivo Sanguinetti (RS), Ivon Barbosa (SP), Janes Markus Mabesoone (PE), José Passini (MG), Leopoldo Henrique Knoedt (BA), Sfrío Silva (RJ), Walter Augusto Francini (SP), Walter Boppré (SC).

Centenário do Esperanto - O Presidente lembrou que a Liga integra a Comissão Nacional para o Centenário do Esperanto a ser comemorado em 1987; além da Liga, compõem a Comissão a Cooperativa Cultural dos Esperantistas e o Conselho Nacional de Esperanto. Foi sugerido que a Liga elaborasse um programa próprio para a comemoração do Centenário do Esperanto, com base nas opções expostas na brochura "Kiu faru kion" editada pela U.E.A. A idéia foi recebida com simpatia, mas a elaboração do programa e sua execução dependerão do aumento de voluntários para os serviços básicos da Liga. *Assuntos Gerais* - A Assembleia aprovou o nome do Sr. José Pedro Milagres para representar o *Komitato* A Dr. Sylla Chaves no 68.º Congresso Universal de Esperanto; a comissão formada pelos associados Jorge Campos de Oliveira, Mário Ritter Nunes e Célio Freitas Martins aprovou o relatório publicado no "Brazila Esperantisto" n.º 276 como sendo cópia fiel do relatório oral apresentado na Assembleia Geral Ordinária realizada em 20 de novembro de 1982, e referente ao mandato do Dr. Sylla Chaves, na presidência da Liga; o presidente Fernando Marinho informou que a Liga Brasileira de Esperanto vem realizando com regularidade reuniões culturais dando cumprimento a um dos itens do "Plano Geral do Trabalho" apresentado por ocasião da candidatura da atual Diretoria. Não havendo mais nada a tratar nem quem quisesse fazer uso da palavra, o Presidente encerrou a reunião da qual lavei a presente ata, assinada por mim, secretário geral, e pelo Presidente. Rio de Janeiro, 25 de junho de 1983. Luiz Alberto Martins, secretário geral. Fernando Marinho, Presidente.



MEDICINA HEROLDO

Aperis la n-ro 10 (Julio 1983) de *Medicina Heroldo* kun jenaj artikoloj: "La Lukto kontraŭ Malario en Brazilo" (D-ro Helio F. Aderne) kaj "Buŝ-Patologio (II) Parodontopatioj" (D-ro Roberto V. Resende).

En tiu numero ankaŭ troviĝas sciencaj novaĵoj, informoj pri kongresoj kaj kunvenoj en Brazilo kaj internaciaj.

Medicina Heroldo estas organo de "Brazila Esperantista Kuracista Rondo" kaj la

unua Brazila esperantista kuracista revuo. Ĝin redaktas D-roj Carlos Lima Melo, Paulo Sérgio Viana, Ezequias Alves kaj Helio F. Aderne.

Adreso: Medicina Revuo

Rua Domingos Grosso, 53 - Venda Nova

30.000 Belo Horizonte, MG

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

Entre 1953 e 1973, o *Brazila Esperantisto* publicou a seção "Aperfeiçoe o seu conhecimento" com o objetivo de ajudar os que desejavam progredir na posse do esperanto. Em cada número publicava-se um trecho seletivo de autor nacional, e no número seguinte, a tradução para o esperanto.

Durante muitos anos, o texto em esperanto foi traduzido por Porto Carreiro Neto, sendo substituído por A. Caetano Coutinho. Por morte deste, Geraldo Pádua e Jorge Campos de Oliveira colaboraram na seção.

Como achamos útil o reaparecimento de "Aperfeiçoe o seu conhecimento", escolhemos um fragmento do "Hino à Palmeira" dos "Poemas sem Versos" de Medeiros e Albuquerque. Este trecho foi objeto do "Concurso de Tradução", em 1928, cujo vencedor foi Oseas Silveira. A seguir publicamos o texto em português; no próximo número, aparecerão a tradução e o artigo de Porto Carreiro "Breves Considerações sobre o Modo de Verter do Português para o Esperanto". Neste trabalho, Porto Carreiro comenta a tradução de Oseas Silveira.

Hino à Palmeira

Medeiros e Albuquerque

A palmeira é a mais bela das árvores. Nossos poetas, os poetas de todos os tempos sempre a cantaram, sempre a exaltaram. Assim que Salomão viu Sulamita, foi na palmeira que pensou.

De onde lhe vem essa beleza? Ela é das coisas inúteis — mas cuja inutilidade é consagrada a sonhos nobres e elevados.

A palmeira é o símbolo dos pensadores desinteressados e ativos. As outras árvores, assim que brotam do chão, dão-se pressa em bracejar as suas folhas em torno; são accessíveis a todas as mãos;

mendigam a luz, atirando seus galhos em todas as direções, torcendo seus caules, estendendo seus ramos por entre os ramos das outras árvores.

A palmeira, não! Ela se levanta, firme e direita, o mais alto que lhe é possível, e é só na extremidade do tronco que abre suas palmas. Acima delas, há ainda a lança verde das folhas não abertas, apontando para o céu e parecendo gritar: "Nós subiremos! Nós subiremos mais ainda!"

A prudência das outras árvores deve murmurar baixinho: "Para que subir? Quanto mais se sobe, mais se fica solitário!"

Mas a solidão não amedronta a palmeira. A única cousa que lhe faz medo é a baixeza. — E a gente admira o seu esforço desesperado para evitar tudo o que rasteja à flor da terra, tudo o que é pequeno e mesquinho.

A palmeira é a mais bela das árvores.

NOVA STRATO

Per la Leĝo n-ro 3.405 de la 11-a de Majo 1983, la urbestro de Lajeado, D-ro Erni Ilmo Petry, donis la nomon "Esperanto" al strato en tiu grava urbo situanta en riĉa regiono de Stato Rio Grande do Sul.

La leĝo rezultis el propono de nia samideano S-ro Lenio Marobin al la prezidanto de la Komununa Cambro D-ro Flávio Ferri.

Ni transkribas la oficialan tekston de la leĝo:

Lei nº 3.405

Denomina de "Rua Esperanto" a rua "B" do Loteamento Antares III.

Erni Ilmo Petry, Prefeito Municipal de Lajeado, Estado do Rio Grande do Sul,

Faço saber que a Câmara Municipal aprovou e eu sanciono a seguinte Lei:

Art. 1º — Fica denominada de "Rua Esperanto" a atual rua "B" do Loteamento Antares III, que principia na Rua "D" e finda na estrada municipal de Carneiros.

Art. 2º — Revogam-se as disposições em contrário.

Art. 3º — Esta Lei entrará em vigor na data de sua publicação.

Gabinete do Prefeito, em 11 de maio de 1983.

Erni Ilmo Petry
Prefeito

Bibliografio

Trigroŝa Romano, Bertolt Brecht. El la germana tradukis Karl Schulze. Edition Leipzig/ Bleicher Verlag, 1977. 374 p.

Socikritika romano de la aŭtoro de Trigroŝa Opero.

☆☆☆

La Granda Kaldrono, John Francis. Stafeto, 1978. 592 p.

Originala romano pri la vivo de familio dum la 1-a kaj la 2-a mondmilitoj.

☆☆☆

La Justuloj, Albert Camus. El la franca tradukis G. Lagrange. TESP, 1977. 80 p. Filozofia dramo.

☆☆☆

En pli granda mondo, F. C. Xavier. El la portugala lingvo tradukis Carlos de Almeida Wutke. Federação Espírita Brasileira, 1977. 215 p.

Mediuma verko diktita de la spirito André Luiz.

☆☆☆

Praktika Bildvortaro de Esperanto. Teksto kompilita de Language Service. Oxford University Press, 1979. 96 p. Ilustrita de C. Clarke kaj R. Burrows.

Bildohava kaj praktika vortaro.

☆☆☆

Tonio Kröger, Thomas Mann. Tradukis Siger Ujeki, postkorektis W. Schmidt. Zame-nhofa Klubo, 1977. 93 p.

Novelo de la grava germana verkisto Thomas Mann.

☆☆☆

Trezorinsulo, R. L. Stevenson. El la angla tradukis Grace Kirkwood. Kardo, 1977. 187 p. Aventurromano pri pirato kaj junulo.



BESTETOJ, BESTEGOJ KAJ BESTAĈOJ

de SYLLA CHAVES

*En la cirko, sen punbato,
kun dresisto ludas foko. . .
urso estas akrobato. . .
kaj sur hundo rajdas koko.*

*Por noktua belulino
rigardanta tra-fenestre
la vesperto, kun fascino,
serenadis muzikestre.*



*Famaj estas: vulpaj feloj,
plumaj liroj de menuroj. . .
kaj la ĝiboj de kameloj,
kaj la vostoj de sciuroj,*

*la okuloj de la linko
kaj l' oreloj de l' azeno. . .
beko de ornitorinko. . .
hida bleko de hieno. . .*

Esperanta verko
por infanoj
eldonita de BEL

*de la ŝafo — multa lano,
de l'abelo — la mielo. . .
ĉio, ŝajne, laŭ la plano
kaj l' ordono de l' ĉielo.*

Jen la unua libro-disko por infanoj originale verkita en Esperanto. Ĝi enhavas 40-strofan poemon pri pli ol 100 bestoj, kaj ankaŭ plurnacian kantbukedon en Esperanto, ĉio tre bele ilustrita. La tuto konsistas el: 1. grandformata bildlibro; 2. 46-minuta disko; 3. sonbendo kun sama enhavo; 4. lumbilda kolekto. Kune kun la Esperanta originalo estas ankaŭ la portugala traduko.



Prezoj ĝis 31.12.83:

libro	Cr\$ 1.800,00
disko	Cr\$ 3.000,00
sonbendo	Cr\$ 3.000,00
lumbildoj	Cr\$ 18.000,00
plus sendkosto	





**Nun, koni Brazilon
estas facile! . .**

Hejme, vi kaj via familio povas vojaĝi tra Brazilo per . .

TURISMA BRAZILLO

Jes, via vojaĝo komenciĝos en la moderna Brasília; poste vi ĝuos la misteron kaj aventurojn en Amazonio. . . Baldaŭ vi estos en la kosmopolita São Paulo aŭ en la plaĝoj de Rio de Janeiro. . .

Ekde nun estas al via dispono vojaĝi tra Brazilo per malalta kosto. Brazila Esperanto-Ligo ebligas tion al vi! La firmao "V-Som Audio-Visuais e Editora Ltda". preparis altkvalitan materialon por vi!

TURISMA BRAZILLO konsistas el 80 belaj koloraj diapozitivaj pri la ĉefaj brazilaj vidindaĵoj. Profesiaj fotistoj kaptis la plej belajn aspektojn de la brazila pejzaĝo por donaci al vi la allogajn turismajn scenojn de Brazilo.


En la albumo estas arkitekturaj verkoj koloniaj kaj barokaj, la insulo Marajó, kie



vivas bubaloj, la Marĉejo en Stato Mato Grosso do Sul, la 40 akvofaloj en la rivero Iguaçu. . .

Vi vidos bildojn de la Nacia Parko de la Sep Urboj, en Stato Piauí, la plaĝoj Boa Viagem en Recife, Farol en Salvador, Copacabana kaj Ipanema en Rio de Janeiro. . .

Plezurigos vin fotoj de "Vitoria Regia", kies folioj foje atingas du metrojn en diametro, danĝeraj felisoj, la delikata birdo "Guará" kun ruĝaj plumoj, simila al la nevo, gigantaj arboj, k.t.p.



TURISMA BRAZILLO estas liverita en plasta skatolo kun 80 diapozitivaj, 1 kasedo kaj teksto. La diapozitivaj venas en plastaj kadretoj numeritaj. La kasedo estas registrita laŭ plej moderna tekniko kun sonefektoj.

Vi povas facile uzi la materialon per ordinaraĵ projekciilo kaj kasedreprodukti-

lo. Tempodaŭro de la kasedo: 14 minutoj.

TURISMA BRAZILLO estas havebla en jenaj lingvoj:

Esperanto-Portugala
Esperanto-Franca
Esperanto-Germana
Esperanto-Hispana
Esperanto-Angla

Prezo por:
Brazilo kaj
Eksterlando -

US\$ 32.00 + sendokosto